


# LA LAMPIRO

62-a jaro, numero 168, 2021: 2



Transiro... tien



# Fondusoj de EASP

Se eblas al vi,  
konsideru la eblecon  
subteni la asocion  
per mondonaco.

Konatiĝu kun niaj fondusoj:

[easp.org.br/asocio/doacoes](http://easp.org.br/asocio/doacoes)



# LA LAMPIRO

62-a jaro, numero 168, 2021: 2

## Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

**Redaktanto:** Paulo Sérgio Viana (psviana@terra.com.br)

**Grafikaranĝo:** Cristovão Rocha Sousa

**Revizianto:** José Roberto Tenório



*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj*

### Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de Marto 1937

### Propra Sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca  
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo  
Telefonnumero: +55 (11) 3862-1183  
easp.org.br | contato@easp.br

### Jarkotizo por 2020

Simpla membro.....R\$ 150,00.  
Subtena membro.....R\$ 300,00.  
Ŝtatinterna membro.....R\$ 75,00.

### Dejoroj:

Sabate: 9h - 12h  
Escepte en la lasta sabato de ĉiu monato, kiam la deĵoro daŭras de la 9-a matene ĝis la 7-a vespere pro la Kultura Kunveno, kiu okazas posttagmeze (ekde la 16h).

### Estraro

**Prezidanto:** Esmeraldo Alencar Lima

**Vicprezidanto:** Paulo Sérgio Viana

**1-a Sekretario:** José Roberto Tenório

**2-a Sekretario:** Sidnéia da Conceição Beall

**1-a Kasisto:** Conceição Rodrigues

**2-a Kasisto:** Maria Delza Macabu

**Direktoro pri propagando:** vaka

### Konsilantaro

Audino Castelo Branco, Marcos Zlotovich kaj  
José Mauro Progiante

### Anstataŭantoj

Shigueco Takahasi kaj Cristovão Rocha Sousa

# ENHAVO

7

Panelo "KOVIM-19,  
kiel ĝi ŝanĝis nin?"

11

La animo de la arboj

21

Transiro... tien

13

Jogo kaj mi

24

Lingvaj Respondoj

8

Homa imunsistemo:  
nia privata armeo

14

Panlatino, la  
planlingvo kreita de  
brazila diplomato

25

Recenzo:  
De nulo ĝis la  
senfino: la  
vivtrajektorio de  
decidemulo

14

Dependigo al  
poŝtelefonoj ekde la  
infanaĝo

10

Tri poemoj de Adélia  
Prado

16

Konsiloj por  
kantotradukanto: eble  
estonte  
kantotradukisto

26

La Rakonto pri La  
Princino Kaguya



Saluton al vi, karaj geamikoj!

Jen ni ĉiuj plu travivas malfacilan momenton, sed estas grave, ke ni zorgu pri ĉies sano. Ni ne amasiĝu grupe, ni konservu prudentan distancon por haltigi la danĝeran kronviruson. Ni plu obeu la regulojn purigi la manojn per akvo, sapo kaj alkoholo, ni zorgu pri sana nutriĝo.

Kunsenteme mi solidaras al ĉiuj familianoj, kies parencoj mortis, pro virusa aŭ aliaj kaŭzoj. Sendepende de politikaj inklinoj, ni laŭeble helpu niajn kuncivitanojn, kiuj tion bezonas. Mi esperas, ke niaj aŭtoritatuloj saĝe agu kaj trovu solvon kontraŭ ĉi tiu terura pandemio.

Krome: se vin trafas informoj pri tio, per kiu ajn komunikilo, kontrolu tiujn informojn kaj ne diskonigu ilin se vi ne estas certa pri ilia fundamento. Se ĉiuj farus tion, oni evitus multe da sufero.



## Vortoj de la redaktanto

En ĉi tiu numero de nia revuo aperas tekstoj de novaj kontribuantoj, kaj tio estas tre feliĉiga afero. Ĝi montras, ke ni larĝigas nian kulturan palettron kaj horizonton. Rusa verkistino Elena Popova estas tre bonvena kaj afable sendis al ni sian belan fabelon; la brazilano (el Suda Riogrando) César Dornelles, veterana kaj sperta Esperantisto, sufiĉe konata de multaj el ni, proponas novaĵojn pri nia moderna mondo; kaj Mário Fonseca el la simpatia urbo Poços de Caldas (Minas Gerais), inaŭguras por ni novan rubrikon “Mia Persona Sperto”. Ni kore bonvenigas tiujn novajn aŭtorojn, kaj dankas, ke ili alportas siajn valorajn artikolojn.

Kaj ni renovigas la inviton, ke aliaj potencialaj verkemuloj sendu al ni siajn elpensaĵojn. Mi estas certa, ke multaj el vi povas valore pliriĉigi niajn paĝojn.

Ek, do!

**PAULO SÉRGIO VIANA**

# Panelo “KOVIM-19, kiel ĝi ŝanĝis nin?”

## La redaktanto

**J**e la 13-a de marto okazis 3-hora, interesa virtuala evento sub la aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio, lige kun la Akademio Literatura de Esperanto (ALE). Amaso da Esperantistoj spektis ĝin per la platformo Zoom kaj Youtube. La celo ŝajne estis preparoli la pandemion mem kaj samtempe motivi la homojn partopreni en la literatura konkurso starigita de ALE.

La tri prelegintoj estis:

- la israelano Amri Wandel, kiu sobre kaj tre objektive parolis pri la sociaj aspektoj de la sanitara problemoj;
- la kuracisto Antônio Vergara vigle kaj iom tro severe parolis pri la medicinaj aspektoj de la pandemio kaj en stranga maniero kritikis kredemulojn (“pri spiritoj” !) kaj vegetaranojn ligitajn al sentimentaj ideoj; tamen li atentigis pri la tre grava ideo, ke ne nur vakcino estas necesa, sed ankaŭ radikala ŝanĝo en la vivstilo de la tuta homaro (ekzemple koncerne al tro da viandomanĝado);
- la kuracistino Margaret Zaleski-Zamenhof, pranepino de nia Majstro, kiu emfazis la afekciajn aspektoj de la homa menso dum la pandemio.




Fine de la tuta programo, du simpatiaj junulinoj salutis la ĉeestantaron, verŝajne por kaŭzi la impreson, ke amaso da junaj homoj feliĉe interesiĝas pri Esperanto dum la pandemia tempo. Ili estis la usonanino Chelsea Moses, kiu jam furoras per sia propra kanalo, kaj la hispanino Marisol Soriano.

La tuta panelo estis elegante kaj ekvilibre gvidita de la prezidanto de ALE, la italo Nicola Ruggiero. Ĉeestantoj povis fari demandojn al la prelegintoj. Nenian informon oni donis pri la proksima Universala Kongreso de Esperanto, programita por Belfasto, meze de la nuna jaro. Duboj plu ŝvebas super nia verda mondo. ■

# Homa imunsistemo: nia privata armeo

ALEKSANDRO PRADO



**L**a homa imunsistemo respondecas pri la tuta sindefendo de la korpo kontraŭ fremdaj substancoj aŭ vivuloj. Ĝi, la imunsistemo, konsistas el imunaj ĉeloj nomataj blankaj globuloj. Unue, la homa haŭto (epidermo) kaj la internaj kavoj gardas la korpon kontraŭ fremdaj invadoj. Kaj la blankaj ĉeloj protektas la internon de la korpo. Tia klarigo estas didaktika en bazaj lernejoj, sed en la praktiko kion tio signifas?

Alivorte, komparu la korpon kun kastelo. En kasteloj estas muregoj kaj soldatoj por defendi sin de la malamikoj, krome la soldatoj

posedas glavojn. Nu, nia korpo simile. La muregoj de la kastelo, kompare kun la korpo, estas la haŭto kaj la soldatoj estas la blankaj ĉeloj. Ĉu blankaj ĉeloj havas glavojn kiel soldatoj? Jes, la armiloj de la blankaj ĉeloj estas antikorpoj. Antikorpoj estas substancoj fare de la ĉeloj por defendi la korpon. Tiam, estas grave scii ke la blankaj ĉeloj denaske konas kelkajn malamikojn kaj bone nuligas la atakon. Tio nomiĝas denaska imuneco, malgraŭ tio aliajn invadojn la blankaj ĉeloj necesas lerni. Tiam, aperas la vakcinoj. Vakcinoj instruas la blankajn ĉelojn kiaj estas la malamikoj kapablaj damaĝi la



korpon. Kiam la homa korpo lernas pri la danĝero kaj scipovas kontraŭataki, tiam tio nomiĝas akirita imuneco. Pro tio vakcinoj imunigas kontraŭ malsanoj.


Okaze de vakcinado la korpo ne ricevas la malsanon, sed la lernadon kiel kontraŭstari ĝin. Kaj la blankaj ĉeloj konservas en sia memoro kiel defendi sin. Foje la memoro perdiĝas pro la tempopaso, tiam oni prenas duan dozon de la vakcino. La homa korpo konstante laboras kaj lernas por defendi sin. Tial, la imunsistemo estas privata armeo preta nuligi la atakon fare de fremdaj substancoj aŭ vivuloj. Foje, virusoj trompas la blankajn ĉelojn kaj nuligas ties agon, kiel la aidsa viruso. La aidsa viruso malpliigas, kaj eĉ nuligas, la imunsisteman reagon.

Tiu privata armeo estas inteligenta kaj rapide agas, kiam okazas atako al

la korpo la nombro da blankaj ĉeloj pliigas. Tamen, povas okazi ke la invado, prefere ni diru la infekto, estas fulma tiamaniere ke la korpo ne havas tempon venki. Tiam kuracistoj disponigas al la imunsistemo la armilojn. Tio estas la antikorpoj. La likvo farita el antikorpo por ŝirmi ĝin kontraŭ malsanoj nomiĝas sero.

Ekzemple: kiam serpento pikas homon kaj injektas venenon, tiam la korpo havas malmulte da tempo por reagi. Do, la homo ricevas la seron kontraŭ la veneno por ke la imunsistemo tuj defendu la korpon. Ĉu evidentas ke la korpo estas mirinda kaj vakcinado estas grava?

La imunsistemo estas privata armeo kiu senĉese laboras por la korpo kaj bezonas ricevi instruojn pere de la vakcinoj. Nun, mi demandas vin: ĉu viaj vakcinoj estas ĝisdatigitaj? ■



Shutterstock



# Iom da poezio

**A**délia Prado (1935) estas grava moderna brazila poeto. Laŭprofesie ŝi estis instruistino dum 24 jaroj. Poste ŝi sin dediĉis al literaturo kaj verkis ankaŭ romanojn kaj rakontojn. Ŝi okupiĝis pri filozofio kaj kristana kredo, sed ŝiaj tekstoj ĉiam montris ian delikatan humuron. Ŝiaj verkoj estis publikigitaj ankaŭ en tradukoj al la angla kaj hispana lingvoj.

3 poemas de Adélia Prado

## Pranto para comover Jonathan

Os diamantes são indestrutíveis?  
Mais é meu amor.  
O mar é imenso?  
Meu amor é maior,  
mais belo sem ornamentos  
do que um campo de flores.  
Mais triste do que a morte,  
mais desesperançado  
do que a onda batendo no rochedo,  
mais tenaz que o rochedo.  
Ama e nem sabe mais o que ama.

## Impressionista

Uma ocasião,  
meu pai pintou a casa toda  
de alaranjado brilhante.  
Por muito tempo moramos numa casa,  
como ele mesmo dizia,  
constantemente amanhecendo.

## Parâmetro

Deus é mais belo que eu.  
E não é jovem.  
Isto sim, é consolo.

3 poemoj de Adélia Prado

## Floro por kortuŝi Jonathan

Ĉu diamantoj estas nedetruoblaj?  
Des pli mia amo.  
Ĉu la maro estas grandega?  
Mia amo estas pli granda,  
pli bela sen ornamaĵoj  
ol kampo de floroj.  
Pli malĝoja ol la morto,  
pli senespera  
ol ondo batanta ŝtonegon,  
pli rezistema ol ŝtonego.  
Ĝi amas, kaj eĉ jam ne scias, ke ĝi amas.

## Impresionisma

Iam,  
mia patro farbigis la tutan hejmon  
per hela oranĝkoloro.  
Dum longa tempo ni loĝis en domo,  
laŭ lia dirmaniero,  
kie konstante mateniĝadis.

## Parametro

Dio pli belas ol mi.  
Kaj Li ne junas.  
Jen estas ja konsolo.

# La animo de la arboj

ELENA POPOVA



Lynn Whit

**I**utage Eli parolis kun sia avino pri la arboj.

— Avinjo, vi kelkfoje diris, ke la arboj estas vivaj kaj havas animon. Ĉu tio estas vera?

— Mi ŝatas legi legendojn kaj librojn, aŭskulti rakontojn de mia avino, kiel vi nun, kaj mi pensas, ke ĉio estas ebla. Multe da verkistoj verkis belegajn rakontojn kaj librojn pri tio, la pentristoj pentras arbojn, arbarojn, multe da homoj nun batalas por savi la Naturon... En ĉiu lando estas arboj — simboloj, arboj de la vivo. En nia lando tiu estas la Kverko. La homoj gardas memoron, ke iam, kiam ne estis en iu vilaĝo preĝejo, la homoj iris ĉe iu olda Kverko kaj tie preĝis, faris la

edziĝfestojn. Oni diras, ke tiu arbo estas sankta. Ĝi vivas ĝis 1000 jarojn. En nia lando estas Kverko aĝa je ĉirkaŭ 1650 jaroj...

Sed ankaŭ estas aliaj arboj, nomataj sorĉitaj, ĉar ili povas forpeli la malbonon, kiel la Acero, la Kornuso...

Mia avino jam rakontis pri la forto de la Nigra Kratago. En iu vilaĝo iam nokte aperis lupfantomo. La vilaĝanoj estis timigitaj kaj ne sciis kion fari. Tiam ili iris al iu saĝa aĝulo. Li ilin konsilis tiel: "Iru en la arbaron, trovu Nigran kratagon kaj haku branĉon. Faru per ĝi plugilon kaj kun ĝi ĉirkaŭbaru la vilaĝon. Ne timu, la fantomo plu ne venos!" La vilaĝanoj plenumis tion kaj

neniam plu venis la fantomo.

— Avinjo, ĉu vi kredas pri lupfantomoj kaj pri tiaj historioj?

— Laŭ mi temas pri niaj timoj, pri niaj pensoj. La pensoj havas forton kaj pro tio ni devas atenti pri kio ni pensas — ĉu pri sano aŭ malsano, ĉu pri Bono aŭ malbono, ĉu pri fantomoj, kiujn ni elpensas...

— Avinjo, vi ne respondis al mi, ĉu la arboj havas animon.

— Kara Eli, vi legas pri la Feinoj, Driadoj... La legendoj diras, ke ili estas la animoj de la arboj. Sed la homoj ne devas renkontiĝi kun ili, ĉar ili havas sian vivon, sian mision, kiel ni, la homoj.

Ne estas malbone, se la arboj ne havas animon, plago estas se ni ne gardas la arbojn, la arbarojn, ni ne

devas neniiigi ilin, ĉar dank' al ili ni havas puran aeron. Ni devas zorgi pri ĉiu arbo...

La fruktodonaj arboj estas sindonemaj, ili lernigas nin esti malavaraj.

La sekvontan matenon Eli iris en la ĝardenon kaj salutis la arbojn:

— Bonan matenon, arboj! Sciigu ĉiujn arbojn, ke mi amas vin. Estu sanaj!

Jen kion ŝi verkis en sia taglibro poste:

## KVERKO

Venu,  
mane min karesu!

Mi promesas —  
fortulo vi revenos! ■



# Mia persona impresoj

## JOGO KAJ MI

### MARIO R. FONSECA

**M**i estis delikata kaj malsana infano, ĝis mi estis 14-jara; tiam okazis malgranda plibonigo de mia sanstato.

Ekde la aĝo de 19 jaroj mi esploris (kaj praktikis) plurajn alternativajn terapiojn, inter ili Jagon.

Mi legis en iuj libroj de la fama jogulo / instruisto Hermógenes, kiun mi konis poste en LBV-kongreso en Braziljo.

Mi memoras, ke mi pasigis 4 monatojn provante praktiki Ŝirŝasana

(surteriĝante sur mia kapo), sekvante la gvidon de la libro de Prof. Hermogenes, SINPERFEKTECO KUN HATHA JOGO. Mi finfine sukcesis fari ĝin kaj mi rekomendas al iu ajn, en ajna aĝo, lerni teknikojn kaj principojn de jago, kiuj tiamaniere alportos al vi nur avantaĝojn.

Konklude, mi raportas, ke hodiaŭ, en la aĝo de 71 jaroj, mia sano estas **PLI BONA** ol tiu, kiun mi ĝuis en la aĝo de 23 jaroj. ■



Blogspot

## ANONCETO

**M**i deziras korespondi kun esperantistoj. Mi ĵus realiĝis al UEA. Bonvolu sendi mian retadreson al viaj membroj, kiuj deziras korespondi. Mi estas nur meznivela esperantisto. Mi uzas retpoŝton ĉar retpoŝto estas pli

malmultekosta kaj pli rapida. Mi estas maljuna emerita koleĝoinstruisto, avo Ed Arnold el Miŝigano, en Usono. Plaĉas al mi koni pri via vivo kaj kulturo. [avoed@mail.com](mailto:avoed@mail.com) ■

# Nia moderna mondo

CESAR DORNELLES

PANLATINO, LA PLANLINGVO KREITA DE BRAZILA DIPLOMATO

**W**illiam Agel de Mello, 83jara, estas eksa brazila diplomato el la ŝtato Goiás [goj'as] kiu eĉ laboris kune kun nacifamaj brazilaj verkistoj Guimarães Rosa kaj João Cabral de Melo Neto. Lia plaĉo pri la studo de lingvoj rezultis je la kreo de du vortaroj: unu pri la latinidaj lingvoj kaj alia pri la latinidaj lingvoj en la Iberia Duoninsulo. Pro tio, ke kelkaj leksikonoj de lingvoj ankoraŭ ne ekzistis, li eĉ vizitis kelkajn lokojn en kiuj ili estis parolataj, kiel Sardion por studi la sardon kaj verki siajn vortarojn sarda-portugala kaj portugala-sarda. La rumana lingvo estis tiu kiu plej grandan laboron postulis de li kaŭze de la granda influado de la slavaj lingvoj sur ĝia leksikono.

Kiel poligloto li finkonkretigis ideon ekde sia adoleskantaĝo krei planitan lingvon, kiun li nomis Panlatino, bazita sur la novlatinaj lingvoj kaj dialektoj, kun la celo senbabeligi la

mondon, laŭ lia propraj vortoj. Laŭ li Panlatino estis kreita matematike, per komputilo, ne sekvanta la ekzemplon de Esperanto, kiu laŭ li temas pri artefarita lingvo formita tro senĝene, sen kriterioj, kio mi diru montras lian mankon pri pli profunda kono pri la zamenhofa lingvo. Ekzemplo de teksto en la panlatina lingvo: Recordo hata hoi. Va tenir l'inspiraci6n en una note d'insomnia signifas Mi rememoras pri tio ĝis hodiaŭ. Mi havis la inspiron dum sendorma nokto. Panlatino meritis ian atenton ĉe la akademia mondo. Krom sindediĉi al ĝi, la aŭtoro ankoraŭ verkis librojn pri fikcio kaj tradukadis.

## Referenco:

SAGGESE, Ana. Recordo hata oi. **Piauí**, Rio-de-Janeiro, okt. 2020, p. 12. ■

## Disvastigo de pediatrio

DEPENDIGO AL POŝTELEFONOJ EKDE LA INFANAĜO

**L**a troa utiligado de poŝtelefonoj povas kaŭzi serion da damaĝoj al la sano de ĉiuj ni, kio inkluzivas infanojn kaj adoleskantojn. Laŭ Jordana Tonezer Tedesco, faka psikiatrino pri infan- kaj

adoleskantaĝo, la tro multa uzado povas influigi negative la cerban disvolviĝon. La disvolviĝo de la cerbo, de ĝiaj konektoj kaj funkciado estas determinitaj de la spertoj kiujn ni vivas tra la vivo. La uzata tempo antaŭ la ekranetoj por distraj celoj

povas malfruigi la maturiĝon, tiel anatomian kiel funkcia, de la cerbo, ŝi asertas.

Laŭ la Brazila Societo pri Pediatrio, la idealo estas tio, ke oni limigu la uzon de poŝtelefonoj rilate al la infanoj tiamaniere: 2-4jara, unu horo tage; 6-10jara, du horoj maksimume. En la aliaj aĝoj, inkludante plenkreskulojn, tri horoj. Laŭ studo realigita en Hindio antaŭ nelonge, sufiĉe bone konata, 65% el la infanoj en la tuta mondo suferas pri elektronika dependo.

Por la pediatriino Mara Mendes, ankaŭ intervjuita por la raportaĵo el kiu mi prenis informojn pri la temo (vd. sube), en la listo de fizikaj kaj mensaj malordigoj kaŭzitaj de la malbona utiligado de poŝtelefonoj (kompreneble ankaŭ de aliaj ekranaparatoj) troviĝas la jeno i.a.:

- nesufiĉeco pri atentkapablo
- aŭdvidaj problemoj
- problemoj pri vertebla kolumno
- hejmemo kaj trograseco
- socia izoligo
- anksio
- incito
- deprimado

### Referenco:

ANDRADE, Andrei. Desafios Extrajogo. **Zero Hora**, Porto Alegre, 20-21 mar. 2021. Vida, p. 4.



# Konsiloj por kantotradukanto: eble estonte kantotradukisto

**PAULO P NASCENTES,**

Emerita profesoro pri la Portugala Lingvo kaj Lingvistiko ĉe Beletra Instituto de Universitato de Brazilo (UnB).

## Enkonduko

**S**aĝa pri popoldiraĵoj, Avinjo diradis: *Paŭĉjo, se konsiloj estus bonaj, neniu ilin donus, sed vendus!* Tial tiu artikolo riskas mistrafe perdiĝi post supraĵa legado kaj sekva forlaso. Ĝia bazo kaj inspiro venas el samnoma rubriko de la internacie konata paĝaro BRAZILA KOLEKTO (BK) de la muzikestro Flavio Fonseca. Malpliigas la risiko tamen se la legantaro, malferme-

mense, aktive trovos interdisciplinajn esplor-eblojn el niaj instigoj. Eĉ se la ĉiutaga vivsperto montras la sufokon vivteni per mongajno, farendaj studaĵoj, portempaj laboroj, multoblaj taskoj, universitataj gejunuloj povas ekvidi oportuna la serion da konsiloj por kantotradukoj. Ĉiu-okaze, certe al kelkaj povos veni la inspiro esplori la temojn sub la gvido de niaj aktivaj profesoroj. Kial ne?

Nestas instituciaj oportunoj por



Dailymail



estontaj seminarioj, simpozioj, konferencoj kapablaj vidigi diversfakajn laboraĵojn por studentoj gvide de orientigaj profesoroj. Relative simpla estas la starigo de esplorgrupo tamen defia estas ĝia daŭrigo. Ĉefaj defioj listiĝas ĉe la unua alineo, tamen sen la kuraĝa alfronto de defioj neniu revo prosperas kaj trapasas la samon, kiel ĉiame. Esploro necesas. Esploro kun institucia subvencio necesas kaj bonvenas. La nuna invito estas por revii, ĉar eĉ promeno, projekto, konstruaĵo postulas fidon je intuicioj kaj konstanta, kongrua, planata celdirekta aktivaĵo, unuvorte, team-laboro. Sur la kampo de Humanismoj, inter- kaj trans-fake navigi necesas, kio implicas kaj ebligas diversfakajn esplorliniojn, fokuson kaj bonan korpuson. Tiu lasta estas sufiĉe ampleksa por la ŝirmado de malsamaj esplor-laboraĵoj.

estu nepre varia, bunta, ampleksa, plurtema, internacikonata kun sufiĉe instiga temaro. Jen kio okazas al BK, paĝaro pri brazilaj kantoj en Esperanto, cele do al la diskonigado de tiuj bazilaj kulturaĵoj tra la mondo kaj de Esperanto same. Fondita la 7-an de septembro 2017, ĝi atingis la ciferon de pli ol 343 mil vizitoj. Estas en ĝi entute pli ol 620 muziktestoj, 78 partituroj, 46 videoj, sepdeko da tradukintoj kaj precipe diversaj kategorioj kaj muzikstiloj, kiaj himnoj, bajono, bolero, bosanovo, frevo, karnavala, korusa, roko, sambo, sertaneca, ŝoro, ŝoto, tango. Krome ili povas esti instrua, instrumenta, porinfana, religia. Estas ankoraŭ multoblaĵoj (diversaj versioj por sama kanto), traduko de traduko (kio montras plurlingvecon), biografieto kaj kuriozaĵoj pri kulturaj aspektoj de la traduko aŭ de la temo mem.

## Unge preni la taŭron

Bona esplor-korpuso

Lacigan tamen ŝatindan laboron atendas kuraĝuloj. Espereble senvolaj, feblaj, lacaj, malviglaj kaj precipe defetismaj esperantistoj preterlasos la aferon, ĉar nur venu al la teamo tiuj pretaj sindediĉi al taskoj plenumotaj, kiaj disvastigo per paĝokreado, laŭebla kontribuo per tradukaĵoj, esploroj, studaĵoj, artikoloj, prelegoj, unuvorte, kulturproduktado. Eblas kolektiĝi ĉirkaŭ tiu korpuso kaj koncernaj projektoj, instruistoj, studentoj, lingvistoj, pridiskursaj analizistoj, antropologoj, sociologoj, etnologoj, akademianoj, profesoroj tutmondaj, kompreneble, antaŭ la kunliga rolo de Esperanto. Eblas esplori pri kreotaj instru-rimedoj same pri Filozofio, Literaturo, Lingvoj, Diskurs-analizo, Traduko, Poezio, Muziko, Folkloro, Moroj, Antropologio, Lingvoscienco, Interlingvistiko, Esperantologio, Pedagogio k. s. Pro tio indas insisti pri la neceso allogi al tiu perspektivo nur talentajn, seriozajn kaj respondecajn personojn vere motivatajn kaj sufiĉe preparatajn. Simplaj scivolemuloj forgesu tion antaŭ tiom da same gravaj farenaĵoj.

## **Naskiĝantaj perspektivoj**

Pli specife, interkulturo, interfaka kunlaboro kaj interlingvaj perspektivoj esta tute natura kampo kadre de Esperanto. BK estas ekzemplo de altnivela per-esperanta

internacia laboro, ĉar inter la tradukintoj estas diversaj eksterlandanoj. Simile povos okazi al la laboro ĉi tie apenaŭ ekvidebla. Ekzemple kaj por konfirmo, ni zorge ekzameni la kreivan laboron de kantotradukanto. Traduko estas beletra fako kaj postulas ne nur talenton sed ankaŭ prilingvan studon. Ĝi entenas la plej diversajn malfacilaĵojn rilate al vortordo, vortosenko, ambiguo, polisemio, sinonimoj, paronimoj, kunmetaĵoj, esprimoj, fakaj vortoj. Krome, altnivela tradukado ĝenerale ne povas esti laŭvorta, enkatenita al la sintakso de la origina lingvo. Ĝi postulas la transmeton de ideoj en novan lingvan etoson, kio signifas respekti la apartaĵojn de la cellingvo. Ĉiutagaj tekstoj montriĝas relative facile tradukeblaj. Male, beletraĵoj ĉiam prezentas neatenditajn defiojn. Inter ili pli malfacile estas la traduko de poemoj, pro la ĉeesto de denotacio kaj konotacio. Poezio estas tiom postulema, ke ne hazarde multaj lingvoj estas konataj kiel lingvo de... Kamono, Cervanto, Ŝekspiro, Danto (jen la portugala, la hispana, la angla, la itala respektive). Poezivortoj ja uzas el ajna lingvo ĝiajn plej kompleksajn kaj kompletajn eblojn.

Se oni konservas mense tiujn apenaŭ listigitan kompleksecon, plej humile oni sin proponos unue lerni, studi, esplori pri tiaj temoj. Multo estas ankoraŭ por kompreni en lingva, kultura, interkultura stud-areoj. En

Brazila Kolekto tio evidentiĝas pro la diversaj versioj de sama kanto far malsamaj tradukintoj. Per la komparo de tiuj multoblaĵoj, eblas konstati la ekziston de diversaj solvoj kaj dirmanieroj. Jen pro tio la paĝo prezentas al veteranoj kaj kandidatoj al la tasko kelkajn konsilojn. Ilin ni ekzameni iom detale. Ĝenerale temas pri trafikaj rimarkoj rilate al teknikajoj, kiaj nombro da silaboj, loko de la forta silabo kaj aliaj same gravaj por la verso-ritmo.

Kelkajn ekzemplojn ni prikonsideru, unue tiujn aperantajn en la Konsiloj mem: “Eu/ sei/ que/ vou/ te\_a/ mar”. Portugale estas ses metrikaj silaboj, ĉar en la kvina la tri gramatikaj silaboj de la esprimo te amar devos esti legataj dusilabe, kiel /tja-mar/. Esperante, tamen, tio ne eblas, ĉar “ĉiu silabo ĉiam korespondas al nur unu vokalo”. Kaj oftaj misprononcoj estu evitataj, ekzemple la dusilaba vorto ki-u ne iĝu unusilaba /kju/. Aŭ la aldono de ne ekzistanta vokalo, ekzemple en ste/lo, kiu ne povas fariĝi trisilaba /is-te-lo/. Same ni atentu pri la loko de la forta silabo, ĉi tie signitaj per majusklaĵ. En tiu sama verso, la forta silabo lokiĝas sur la dua, kvara kaj la sesa silaboj, tiel: Eu/ SEI/ que/ VOU/ te\_a/ MAR. Same, do, en Esperanto la fortaj silaboj ankaŭ devas lokiĝi sur la dua kaj la sesa. Kaj la trafa traduko povas esti unu el tiuj du ebloj: Vin Amas mia KOR’ kaj Mi Amos ĉiam VIN. Poste venas la konsilo, ke laŭeble oni konservu

en la sama loko la samajn vokalojn de la origino. Kaj fine estas libro-indikoj. Sur la paĝo vi konstatos la rekomendon de tri aŭtoroj, nome Roel Haveman, Roger Bernard kaj Pier Luigi Cinquantini.

Prospaserte eblas diri, ke similaj malfacilaĵoj bezonis esti alfrontitaj dum la esperantigo de la konata kanto de Milton Nascimento kaj Ronaldo Bastos Fé cega, faca amolada. Sube mi komentos kelkajn problemojn kaj solvojn okazintajn en la unua strofo. Tiucele do ni komparu ekzemple la lokiĝon de la forta silabo (majuskle- litere), en la versoj de ĉiu lingvo kaj vidu, ĉu eblis aŭ ne uzi la saman vokalon de la originalo, laŭ la rekomendo.

Ekzemple, en la unuaj versoj la fortaj silaboj estas la dua, la oka kaj la dek kvina:

aGOra não pergunto MAIS pra onde vai a esTRAda de NUN mi ne scivolas PLU al kie voj’ vojAĝas.

Ĉi-kaze eblas konstati, ke la koincido fakte okazas kaj ĝi ebligas la kantadon de la kanzono. La samo evidentiĝas en la ceteraj tri versoj.

aGOra não espero MAIS aquela madruGAda

vai SER, vai SER, vai ter de SER, vai SER faca amoLAda

o brilho CEgo de paiXÃO e FÉ, faca amoLAda

Kontrolu mem, kompare, per la subaj esperantaj versoj.

de NUN nek plu la frumaTEno estas atenDAda,

ŝoSE', ŝoSE', nepra ŝoSE', ŝoSE',  
tranĉilo Akra  
la BLINda brilo de paSI' kaj fID',  
tranĉilo Akra


Alia rimarkindaĵo estas, ke nur en la tria verso de la strofo SER/ SE' la dezirata koincido povis okazi, tamen, notindas la neceso marki la forigon de la vokalo per la apostrofo, cetere tute subtenata de la Fundamento: ŝoseo/ ŝose'.

## Konklude

La mondo multe ŝanĝiĝis kaj plu ŝanĝiĝos. Paradokse, la neceso izoliĝi hejme ŝajnas porti la trajton nin virtuale kunligi plu. Kiel vidite, la brazila esperantistaro, precipe studentoj orientataj de siaj profesoroj, havas la perspektivon eniri novan etapon de la uzo de Esperanto. Pli bone dirite, per Esperanto ni povos partopreni formalajn esplorgrupojn kaj eventojn instituciajn kaj interinstituciajn kune kun esploristoj ekster Esperantujo. Certe interfakaj esploroj ebligas al ni estonte atingi la tri kolumnojn de universitatoj, nome instruo, esploro kaj etendiĝo. Strategie, verŝajne estas indicoj, ke plibone estas komenci nian marŝadon dupiede, tiu estas per la starigo de esplorgrupo kaj la kunlaboro kun profesiuloj el diversaj fakoj.

## Referaĵoj... liberstilaj

BRAZILA KOLEKTO. “Konsiloj”. Tie estas la referaĵoj de la paĝaro. KALOCSAY, Kálmán. “La klasika metriko kaj Esperanto”. La Nica Literatura Revuo, Nice n. 4/5, p. 164-171, maio-jun. 1959. Disonebla en <http://literaturo.org/HARLOW-Don/Esperanto/Literaturo/Revuoj/nlr/nlr45/metriko.html>. NASCENTES, P. P. Traduko de la kanto “Fé cega, faca amolada. In: Brazila Kolekto. <https://www.brazilakolekto.com/2017/09/blinda-fido-trancilo-akra.html>



*Kovrilo je muzikdisko de Milton Nascimento*

# Transiro... tien

## LEANDRO ABRAHÃO

La forpaso de la brazila Esperantistino Neusa Priscotin Mendes (1949-2021), karesnome MiMa (jes, kun du majusklaĵoj, laŭ ŝia prefero mem) kortuŝis la Esperantistaron, ne nur en Brazilo. Al ŝi Rogener Pavinski, redaktoro de la revuo Kontakto, organo de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo), dediĉis en sia fejsbuka paĝo “la kovrilon” de la aprila numero de la revuo Esperanto: “10 jaroj kiel redaktoro de Revuo Kontakto. Mi dediĉas ĉi tiun kovrilon al mia ĵus forpasinta unua instruistino de Esperanto, MiMa.” Esperanto Ilustrita raportis pri ŝi, ankaŭ la Bita Bulteno de Brazila Esperanto-Ligo (BEL). Esperantistoj plurloke en Interreto kondolencis kaj bedaŭris, sed ne nur. Pli elstare estas la elverŝo de sentoj pri la ĉiam ridetanta emerita flegistino. MiMa naskiĝis, vivis kaj forpasis en la urbo Ribeirão Preto-SP, kie ŝi dum multaj jaroj agadis por Esperanto i.a. ĉe APERP (Associação Pró-Esperanto de Ribeirão Preto), kies unu el la fondintoj ŝi estis. La sidejo de la Asocio estas ŝia domo mem. Tie ŝi, kiu ne havis gefilojn, vivis kune kun la jam maljuna fratino, kiun ŝi verdire flegis ĝis ŝia forpaso antaŭ kelkaj jaroj.

Mi vizitis ŝin kun mia edzino en 2010, eble. La domo ekstere aspektis simpla. Nealta muro sur kiu estis nelonga vertikala stangaro kiel barilo. La garaĝo estis efektive la Asocia instruejo. Blanka tabulo sur la muro, seĝoj (ĉu brakaj, mi ne plu memoras). La vizitoĉambro estis la Asocia akceptejo. Bone aranĝitaj bretoj kun multe da klasikaj libroj. Danke al tiu vizito, ununura cetere, mi ricevis donace “Martan”, en traduko de Zamenhof, kaj “Fundamentan Krestomation”. Impresis min la zorga ordecio de la ejo. La Asocio kalkulis pri la profesia agado de loka Esperantisto, nome Claudinei. Ni tranoktis tie. Multe konversaciis. Post la manĝo ŝi eksidis por siesto iom kline, pro, laŭ mia memoro, stomaka *afero*. Ŝi ja brave frontis plurajn kadukaĵojn, ĉe la kruroj, ekzemple. Tiu vizito ne estis hazarda, sed celkonscia. Ni ja vizitis la urbon la unuan fojon kaj aparte por intervidiĝi kun ŝi, kun kiu ni konatiĝis kelkajn jarojn pli frue. Tio estis la jaro 2006. Ni vojaĝis al Campo Grande-MS, por partopreni eventon, nome CONCAFRAS-PSE, danke al kiu, kiel mi malkovris poste, s-ro Lício de Castro, eksprezidanto de BEL kaj de Esperanto-Asocio de Braziljo iam konatiĝis kun

1 En la libro “CONCAFRAS 50 ANOS”, Eldonejo Auta de Souza, aperas intervjuo kun s-ro Lício.

Esperanto.<sup>1</sup> Temas pri spiritista aranĝo, kiu i.a. ofertas kursojn de kaj pri la Internacia Lingvo. Tien vojaĝis Flávio Fonseca, pro invito de la Esperantisto kaj kuracisto Alexandre Melo, unu el la organizintoj de tiu jubilea evento, kiu tiam solenis sian 50-an jariĝon. Mi estis ege ĝoja! La unuan fojon mi partoprenos Esperantistan aranĝeton. Temis pri prelego, sed mi estis vere tre kontenta. Mi eklernis Esperanton kelkajn monatojn pli frue, iom pene, pro manko de lerniloj, en mia tiama loĝurbo, Uberlândia-MG. Tiam mi disponis sole nur pri la komputila programo de S-ro Carlos Pereira.

En la prelegoĉambro estis MiMa, gaja, parolema, entuziasma. Mi memoras, ke iufoje ŝi ne nur ekparolis, sed ekstaris por pli libere esprimi sin per movado de la brakoj. Mi... apenaŭ komprenis... ne nur ŝin. Tamen, mi memoras, ke mi kuraĝis ion demandeti al la preleganto. Laŭ tio, kiel mi aŭdadis la prelegon kaj la ĉeestantojn mi notis (ĉefe mallerte) novajn vortojn, esprimojn. Post la fino de la prelego mi iris al ŝi, kiu al mi estis tre simpatia. Mi montris al ŝi mian liston de (mis)notitaj vortoj, kaj ŝi afable korektis ilin. Unu vorton mi

aparte memoras: *iomete* (kiun mi notis erare).

Ŝi diris al mi (mi ne certas, ĉu en tiu okazo, ĉu iam poste dum CONCAFRAS), "vi bezonas iun libron. Mi sendos al vi". Post kelka tempo poŝtisto liveris al mi "Saluton!



Esperanto Aŭtodidakte”.<sup>2</sup> Mi tuj eklegis kaj elplenumis la taskojn en semajno. Mi estis tre, tre feliĉa! Ĝi

<sup>2</sup> Ismael Ávila produktis senpagan komputilan version: <http://kursosaluton.org>

estis mia unua lernolibro de Esperanto. “Saluton!” lernigas la lingvon senpere, per rekta metodo. Cetere, MiMa estis unu el la mulmultaj brazilaj diplomitaj Cseh-metodaj instruistoj. Baldaŭ en la sama jaro mi revidis ŝin. Okazis en Ribeirão Preto la 1-a Brazila Renkontiĝo de Esperantistaj Spiritistoj (BRES). Kiaj bonaj memoraĵoj! Ŝi estis unu el la organizantoj, kaj prezidis la eventon. En la laŭvica jaro la evento okazis en Uberlândia. Ŝi venis pli frue, por la preparlaboroj, kaj gastis en la domo de mia bopatrino. Ŝi kunportis ekzempleron de Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, pri kiu mi evidente avidis. Temis pri multekosta

verko, kiun mi tiam neniel povus akiri. Iam mi estis foliumanta la vortaregon, ŝi sidis proksime. Jen ŝi subite diris, “mi donacas ĝin al vi”. Mi raviĝis, vere preskaŭ krevis de ĝojo. Mi neniam plu renkontis ŝin persone. Tamen, ni plu korespondis retletere, kelkfoje interparolis telefone, kaj en la lasta tempo interŝanĝis mesaĝojn per vacapo. Kiam forpasis Luiz Antonio de Oliveira, la ĉeforganizinto de la 2-a BRES en 2007, mi informis ŝin. Ŝi, tute neekscitite asertis, ke li simple *transiris*. Tion mi mem nun diras al mi. Ŝi *transiris*... tien, kie mi esperas iam povi brakumi ŝin. ■



# Lingvaj Respondoj

FRANCISCO S. WECHSLER

## Demando:

Ĉu la esprimoj *lasi en kaj restigi en* estu sekvataj de akuzativo?

Ekzemple:

Ĉu *mi lasis mian libron en la ŝranko* aŭ ... *en la ŝrankon*?

Ĉu *li lasis sian infanon en la lernejo* aŭ ... *en la lernejon*?

Ĉu *Petro restigis sian viandon en la fridujo*, aŭ ... *en la fridujon*?

Ĉu *ŝi restigis sian korespondaĵon en la tirkesto*, aŭ ... *en la tirkeston*?

## Respondo:

La verboj *lasi kaj restigi* normale ne esprimas movon per si mem, do en ĉiuj supraj ekzemploj oni preferinde ne uzu la N-finaĵon de direkto.

Tamen efektive Zamenhof uzis *lasi en* almenaŭ unu fojon por esprimi direkton (sed kun subkomprenata verbo de almovo); tian uzon aliaj aŭtoroj ne sekvis. Aliflanke, mi sukcesis trovi neniun tian uzon de *restigi en*, ĉu ĉe Zamenhof, ĉu ĉe aliaj bonaj aŭtoroj. Se oni ja intencas esprimi direkton de almovo, la verbojn *lasi* aŭ *restigi* eblas anstataŭigi per pli taŭga verbo, kiel ekzemple: *metis la libron en la ŝrankon*, aŭ *enŝrankigis la libron*.

Jen la koncernaj ekzemploj ĉe Zamenhof:

*La adresojn, kiujn ni ricevis skribitaj per literoj latinaj, ni lasis en la formo, en kiu ni ilin ricevis [...]* (Lingvaj Respondoj, 1890)

*La tie kreskantaj beroj lasas post si en la mano, kiu ilin deŝiras, neforigeblan makulon.* (La Batalo de l' Vivo, 1891)

*La literojn j kaj b mi [...] decidis lasi en mia proponota alfabeto [...]* (Pri Reformoj en Esperanto, 1894)

*[...] se ia vorto estis erare aŭ nelerte tradukita, mi ĝin lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe; [...]* (Antaŭparolo de la Fundamento de Esperanto, 1905)

*Steliston neniu lasas en sian domon.*

(§ 37 en la Ekzercaro de la Fundamento de Esperanto, 1905) — Ĉi tie estas subkomprenebla la esprimo *lasas eniri en*, kiu samsignifas al *enlasas*: *Kaj neniun flankan personon enlasu en la domon, precipe komercistojn!* (La Revizoro, 1907)

*Kaj la Eternulo [...] per glavo batis ĝin kaj ĉion vivantan, kio estis en ĝi; li lasis en ĝi neniun restanton.* (Malnova Testamento, 1916)

*Feliĉaj estas vi, [...] kiuj lasas en libereco la piedojn de la bovo [...]*

(Malnova Testamento, 1916)

*Tial mi faras en mia projekto la sekvantajn ŝanĝojn: 1. j kaj b mi jam pli frue restigis en la alfabeto; [...]* (Pri Reformoj en Esperanto, 1894)

*El tiu speco de vivantaj malbonaj homoj staris nun du apud la mortinta viro, kiun oni antaŭ la enterigo restigis en la preĝejo.* (Fabeloj de Andersen 1, 1909)

*[...] siajn malgrandajn kaj grandajn brutojn ili restigis en la lando Goŝen.* (Malnova Testamento, 1916)

*[...] li restigis en Edomujo garnizonojn, [...]* (same)

*[...] la skribbrulaĵon ili restigis en la ĉambro de la kanceliero Eliŝama [...]*

(same)

*Sed la malriĉulojn el la popolo, kiuj nenion havis, Nebuzaradan, estro de la korpogardistoj, restigis en la lando Juda [...]* (same)

*Sed ĝian ĉefan radikon restigu en la tero, [...]* (same)

*[...] sed nur ĝian ĉefan radikon restigu en la tero, [...]* (same)

*Mi restigos en via mezo popolon humilan kaj malriĉan [...]* (same).



# Recenzo

**MARIA NAZARÉ LAROCA**

“DE NULO ĜIS LA SENFINO

LA VIVTRAJEKTORIO DE  
DECIDEMULO”

Aŭtoro: Flávia Halfeld

Eldonejo: Editar Editora Associada  
2021

Kun plezuro kaj granda emocio mi tralegis la sukan biografion de nia kara samideano José Passini, vera heroo de alloga rakonto bildigita per la tre agrabla teksto bonstile verkita de Flávia Halfeld, membro de la Beletra Akademio de Juiz-de-Foro, MG.

Krom la respektinda travivado de la italdevena José Passini, la verko enhavas interesajn trajtojn de la monda historio, nome la odiseadon de la italaj enmigrintoj,

translokiĝintaj al Brazilo pro la ekonomiaj kaj sociaj malfacilaĵoj en Eŭropo dum la frua XX jarcento.

José Passini naskiĝis la 11-an de Aprilo 1926, en municipdistrikto Nova Itapirema, ŝtato San-Paŭlo.

Ekde sia infanaĝo li harde perlaboris vivon ĉiam helpante la familion.

Kiel nudpieda knabo, li ĉesis studi pro laborkialo, revenis al la lernejoj studoj kiel plenkreskulo, gajnis premiojn en la Aerarmeo, translokiĝis de San-Paŭlo al Minas-



Ĝerajso, formis belan familion, kun adoptitaj kaj biologiaj infanoj. En Minas-Ĝerajso, urbo Juiz-de-Foro, li daŭrigis kun kompetenteco kaj amo sian perlaboron pri mekaniko.

Instigita de amikoj, kiujn li konkeris ĉi tie, li frekventis la Beletran Superan Kurson de UFJF pri Lingvoj kaj Literaturo, kaj fariĝis profesoro pri la itala kaj angla lingvoj en la Federacia Universitato de Juiz de Fora. Tie li ankaŭ aktivis kiel profesoro de Esperanto. Li sukcesis majstriĝi kaj doktoriĝi, verkante du diplumlaboraĵojn, nome disertacion kaj doktoriĝan tezojn pri la internacia lingvo Esperanto, la unuan en PUC - RJ kaj la duan en UFRJ. Fine li atingis la gravan postenon de Rektoro de la Federacia Universitato de Juiz de Fora.

Dum sia tuta vivo li neniam flankenlasis sian viglan kaj senlacan laboron kadre de Spiritismo kaj ankaŭ de Esperanto-movado, per prelegoj celante la disvastigadon de nia lingvo, kaj enlande kaj eksterlande.

Tiun legindan kaj esperantigindan libron mi forte rekomendas al vi. Sufiĉas retmesaĝi al la afbla aŭtoro per la jena retadreso:

flaviahalfeld@gmail.com

ANNA LOBO

## LA RAKONTO PRI LA PRINCINO KAGUYA

Originala nomo: Kaguya-hime  
no Monogatari かぐや姫の物語

Direktoro: Isao Takahata

Produktejo: Studio Ghibli

Lando: Japanio

Lanĉo: 23.11.2013

Tempodaŭro: 137 min



Mi invitas vin eniri en magian etoson de porinfana japana filmeto, kies nomo estas “La Rakonto pri la Princino Kaguya”. Mi ĉiam vidis tiun filmon en la listo de Netflix, kaj nun mi profitis la okazon por spekti kaj recenzi ĝin por vi. Mia unua granda surprizo estis malkovri ke ĝi estas produktita de Ghibli. Pro la akvareleca stilo de la animacio, kaj eĉ ankaŭ pro la iom malsamaj trajtoj de la desegnoj kaj roloj, oni pensas ke ĝi ne estas io farita de tiu konata japana animacia produktejo de Hayao Miyazaki. Tiu impresado estas komprenebla kiam oni rimarkas ke ĝi estas direktita de Isao Takahata. Malgraŭ tio, oni povas ankaŭ klare rimarki la tuŝojn de Hayao ĉe la etoso de la filmo, kiu estas ja ege kortuŝa.

Surbaze de popola japana historio “La rakonto pri la Bambua Tranĉisto”, la filmo parolas pri la

princino Kaguya kiu estis trovita ene de brila bambuo de Sanuki, la bambua tranĉisto.

De tiam ŝi estis flegita de Sanuki kaj lia edzino Ona, kiel se ŝi estus ilia filino. Kiam ŝi iĝis iom pli maljuna, ili decidis translokiĝi de la kamparo al la urbo kaj eduki ŝin por iĝi vera princino, pensante pri ŝia feliĉo. Sed manko de ŝiaj amikoj, de kamparo kaj liberereco multe deprimis ŝin. Kiel ŝi agos? Kio okazos al ŝi meze de tiom da postuloj en tiu nova vivstilo? Ĉu ŝi perdiĝos de tiu kiu ŝi estas? Ĉu ŝi silentos kaj akceptos aŭ reagos? Ĝi certe multe pensigas nin pri nia vivstilo kaj kion ni volas krei por nia vivo, kaj la valoro sperti la vivon. Tiu estas tre bela filmo, taŭga por tuta familio. Mi instigas al vi spekti tiun ĉi ĉarman, magian ravan filmeton kaj ekkoni pli pri japana kulturo.

Ĝis la sekva filmo! ■



#1

KION

VI

ŜERCAS?

Vidu nian kanalon!

[youtube.com/user/Vivagazeto](https://www.youtube.com/user/Vivagazeto)



#07

Lingva  
Provoko

A associação aceita  
novos filiados.

Porém se você é  
membro e ainda  
não renovou...



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Aproveite  
para renovar  
sua filiação à EASP.

Esperamos poder  
contar com sua  
adesão

Acesse o site da EASP ou vá direto à página abaixo

[easp.org.br/asocio/kotizoj\\_2021.html](http://easp.org.br/asocio/kotizoj_2021.html)